

# Rememoroj de israela Esperanto-veterano

(aperis en *Israela Esperantisto* n-roj 150-153)

**Josef Ŝemer**

## Unua parto: 1966 – 1968

LA 11.11.2008 MI komencis gvidi kurson de Esperanto en la Centro Bikurej-Haitim, Tel-Avivo. Mi staris ĉe la tabulo rigardante la 10 novajn diversaĝajn gelernantojn kaj subite pensis: “Ja ĝuste en tiu ĉi klasĉambro mi lernis Esperanton en la jaro 1966, do antaŭ 42 jaroj!” Ĉu tio ne estas mirinda?!

Kiel 16-jara tel-aviva knabo mi aliĝis tiam al la unua kurso de d-ro Henryk Maschler [Henrik MAŠLER]. Mi vidis en la strato grandan afiŝon, kiu anoncas kurson de Esperanto, kaj tuj decidis aliĝi. Pri la Internacia Lingvo mi aŭdis de mia patro, kiu fieris pri tio, ke la kreinto de tiu ĉi lingvo estis lia samurbano, do Bjalistokano. Mi partoprenis la kurson lernante tre fervore kaj tuj enamiĝis je Esperanto. Tiu ĉi “viruso” infektis min tiam kaj ne forlasis min ĝis nun. Kiel mi jam diris, la kurso okazis en la sama ĉambro kie okazas nuntempe ĉiumarde la kunvenoj de la E-klubo kaj ankaŭ la nuna kurso. Sed la centro “Bikurej-Haitim” portis tiam la nomon “Bejt Ha-noár” (Junulara Domo).

La iniciatinto de kaj la instruisto mem, Mašler (1908–1991), eksterordi-nara homo unika kuracisto, ege de ĉiuj. Li lernis Esperanton nur kelkajn post sia alveno al el Pollando (en 1950), ekaktivis en la movado. Li



la kurso  
d-ro  
estis  
kaj  
amata  
  
jarojn  
Israelo  
kaj tuj

ekkomprenis, ke sen kursoj tiu ĉi eta movado ne havas estontecon. Tiam li decidis traduki hebrean (helpe de kelkaj bonaj hebrelingvanoj) pollingvan lernolibron de Esperanto, kaj adapti ĝin por la hebreparolantoj. Li mem propagandis la kurson kaj mem organizis la tutan bezonatan loĝistikon. Li instruis tre fervore, kun granda amo. Li ankaŭ kuraĝigis la lernantojn viziti la tel-avivan E-klubon, kie oni kunvenis ĉiun dimanĉon je 20:00 en komforta ĉambrego ĉe str. Kálišer 48 (apud la stratoj Naĥalát Binjamín kaj Állenby). Nia Ligo ricevis malavare tiun ĉi lokalon por ĉiudimanĉa uzo jam en marto 1959 (!) de la grupo “Arbajter Ring” (t.n. “Jidistoj”). Tuj post la kurso, kiu finiĝis la 8-an de aŭgusto 1966 (laŭ la atestilo kiun mi gardas ĝis nun!), mi komencis viziti regule tiun ĉi klubon. Mi neniam forestis de la kunvenoj, eĉ kiam en la morgaŭa mateno estis okazonta matur-ekzameno en la mezlernejo. Mi biciklis tien de mia hejmo, en la nordo de Tel-Avivo. Mi neniam forgesos kiel mi – 17-jarulo – ĉeestis la klubkunvenon okazintan dimanĉe la 4-an de junio 1967 vespere, kaj ankaŭ la sekvantan, kiu okazis dimanĉe la 11-an de junio. Eble kelkaj el vi memoras kiu grava

evento okazis inter tiuj du datoj: jes, la Sestaga Milito! La milito komenciĝis lundon la 5-an de junio matene kaj finiĝis sabaton la 10-an de junio posttagmeze. Do, verŝajne niaj generaloj planis la militajn demarŝojn tiel ke nia ĉiudimanĉa kluba agado ne estu ĝenata...

En la komenco ni estis nur du junuloj en la klubo: mi kaj plia kurs-fininto, same gimnaziano. Post kelka tempo li ĉesis veni kaj mi restis la sola “infano” tie. Mi sentis min



iomete strange inter la “maljunuloj”, sed mia amo al Esperanto estis tiel forta, ke mi decidis tamen resti. Mi konsideris la aliajn klubanojn “maljunuloj”, sed kiam mi pensas pri tio nun – estante 58-jara – mi komprenas, ke ili estis tiam “nur” 50-60-jaraj, do simile al mia nuna aĝo...

Mi menciuj kelkajn tiamajn lokajn aktivulojn kaj ankaŭ aliajn membrojn, kiuj kontribuis dum tiuj jaroj (1966–1968) al la kluba programo: Isaj kaj Anna Dratwer, d-ro Henrik Maŝler, Aleksander Manor, Dora Wunderbaum, Naĥum Drezner, Jeĥiel Ben-Alter, Nissim Israeli, Israel Israeli, d-ro Jaakov Beĥar, Josef Murĵan, Aŝer Ron, Kamil Perlman, Jeraĥmiel Giladi kaj Jehuda Feĥter-Bar Ŝraga. Preskaŭ ĉiuj klubanoj kaj aktivuloj naskiĝis eksterlande, ilia plimulto en Pollando, kaj kelkaj aliaj en Bulgarujo, Rumanujo kaj Ruslando.

Estas malĝoje pensi nun pri tio, ke ĉiuj tiuj supre menciitaj karaj homoj, kaj ankaŭ la aliaj aktivuloj de ELI, vivintaj en aliaj landpartoj (Josef Kohen-Cedek, Moŝe Savir, Jeĥezkel Armoni, Leo Ringler...), jam delonge forlasis nin poreterne. Kaj mi, kiu estis tiam la plej juna klubano, mi mem ne plu estas juna.

Estas tre malfacile imagi al ni nuntempe, kiamaniere oni sukcesis funkciigi tiam agadon de landa asocio kaj loka klubo: sen Interreto, sen komputilo, sen telefono (malmultaj familioj havis tiam hejman telefonon), sen faksilo, sen fotokopia maŝino, sen...

Kio okazadis en la tel-aviva klubo, krom societa interparolado kaj duonhora perfektiga instruado far d-ro Maŝler? Do, ĉiusemajne okazis prelego. Laŭ mia memoro, malsame ol hodiaŭ ne okazis tiam aliaj specoj de programoj. La plej elokventa preleganto estis la rumandevena Kamil Perlman el Petaĥ-Tikva, kiu ofte rakontis al ni pri unu el la

famaj pasintecaj komponistoj, pentristoj aŭ verkistoj. Do, dum la jaroj li rakontis al ni kelkajn fojojn, tre fervore kaj aktorece, pri Mozart, Haydn aŭ Schubert, ripetante la saman prelegon. Sed tio ne tro ĝenis la homojn, ĉar ili ŝatis lian parolmanieron.

Neforgesebla estis unu prelego de Aŝer Ron el Ra'anana, kiu parolis pri la Palestinanoj kaj la sorto de la "Okupataj Teritorioj". Li ŝokis la aŭskultantojn dirante ke Israelo devas redoni la teritoriojn al la palestina popolo, por ke ĝi fondu tie sian propran ŝtaton. Memoru ke tio okazis nur kelkajn monatojn post la milito kaj tiuj ideoj, kiuj estas sufiĉe popularaj nuntempe, estis tiam avangardaj kaj netolereblaj de preskaŭ ĉiuj el ni. Tial oni ege koleris je li kaj malhelpis al li per krioj; tiam li ofendiĝis kaj poste ne aperis en la klubo dum multe da tempo...


## Dua parto: 1967

MI VIZITADIS la klubon ĉiudimanĉe, ĝis la tago de mia soldatiĝo (nov. 1968), iom post la aĝo 18. Post la trijara arma servo mi revenis al mia "verda familio", sed tiam la klubo jam situis en alia loko: en subtera loĝejo ĉe str. Rembrandt 18, Tel-Avivo. La forlaso de la lokalo en Kaliŝer-strato okazis dum 1968.

La tiamaj veteranoj rakontis al mi ke dum la 50-aj jaroj la esperantista agado en Tel-Avivo estis malmulta kompare al tiu de la 40-aj jaroj. Tamen okazis tie regulaj semajnaj kunvenetoj, en privataj hejmoj. Nur en 1959, la jubilea jaro de Esperanto (1859–1959), denove revigliĝis la agado: fondiĝis la "Kaliŝera" klubo kaj ekaperis la revuo NIA LIGILO. Tamen ĝis la jaro 1966, kiam d-ro Maŝler komencis la serion de la kursoj, ne venis al la movado multaj novuloj. Post mia kurso li daŭrigis la instruadon kaj gvidis dum kelkaj jaroj du kursojn ĉiujare, en la sama domo. La urbestro de Tel-Avivo disponigis al ni senpage la klasĉambron kaj ankaŭ helpis al ni pri la strataj afiŝoj (estis foje aliaj tempoj...).

D-ro Maŝler estis en tiuj jaroj, kaj dum la 70-aj jaroj, la motoro de la Li multege prelegis pri Esperanto en lokoj, inkluzive de mezlernejoj. Li informadis pri Esperanto en la amaskomunikiloj kaj dank' al lia varba instrua agado la nombro de la israelaj esperantistoj kreskis signife. Novaj fortoj inkluzive de junuloj.

Sed sendube la plej elstaraj kaj indaj okazaĵoj (aŭ "neokazaĵoj"...) de la jaroj estis la planitaj Universala de Esperanto (UK) kaj Internacia Junulara Kongreso (IJK).



finance

ankaŭ  
movado.  
diversaj

kaj

aperis,

memor-  
sesdekaj  
Kongreso

Sekve de invito far ELI, decidis UEA kaj TEJO okazigi en julio 1967 siajn kongresojn en Israelo. La UK devis okazi en Tel-Avivo kaj la IJK en Netanjá. Fondiĝis Lokaj Kongresaj Komitatoj (LKK) por ambaŭ eventoj. Josef Kohen-Cedek el Jerusalemo fariĝis prezidanto de la LKK. Sed ĝia 'motoro' estis sendube la vicprezidanto de la LKK kaj prezidanto de ELI, Isaj Dratwer el Bat-Jam, eminenta kaj mondkonata Esperantisto (interalie la ĉefaktivulo de la pola E-movado ĝis lia alveno al Israelo kaj proksima amiko de Ivo Lapenna). Komenciĝis la laboro. Mi mem ne partoprenis ĝin estante tre juna



novulo, sed atingis min eĥoj pri diversaj kvereloj okazintaj inter la LKK-anoj. Kelkaj membroj rakontis ke I. Dratwer estis tro severa kaj 'diktatoreca'. Iu rakontis al mi interesan kuriozaĵon pri tio, kio okazis dum unu el la kunsidoj de la LKK: kiam ekflamiĝis tiam la kriadado, la italo s-ro G. Pompilio – tiama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, kiu ĉeestis parton de la kunsidoj – subite laŭtkriis: *MASPIKAS!* (maspík, hebree: sufiĉe)

Kiel kongresejo estis elektita Domo Bnej-Brit en Tel-Avivo, situanta en str. Káplan. Oni planis solenan inaŭguron en Jerusalemo, belajn ekskursojn ktp. Kun granda ĝojo oni akceptis la konsenton de la prezidento Zálman Ŝazár fariĝi prezidanto de la Honora Komitato, kun lia promeso "eble ĉeesti la Inaŭguron". Granda entuziasmo regis tiam inter la israelaj esperantistoj.

Sed kiam en la mezo de majo 1967 ekis la streĉiteco inter Egiptujo kaj Israelo kaj ombroj de proksimiĝanta milito kovris la ĉielon, UEA decidis jam je la 31-a de majo (!) translokigi la UK-on de Tel-Avivo al Roterdamo. Mi memoras ke niaj aktivuloj estis tre koleraj pro la "tro hasta" decido kaj protestis kontraŭ ĝi, sed nenio helpis. Ni devis do atendi ĝis la jaro 2000 por efektiviĝi nian revon pri UK en Tel-Avivo.

Eble interesas vin scii, ke 119 (!) israelanoj aliĝis al la tel-aviva UK (en 2000 aliĝis nur 70 el Israelo), ke la oficiala kongresa vojaĝagentejo estis Peltours, ke la tuttaga ekskurso al Jerusalemo ne inkludis viziton de la Muro de Ploreĝo, ke la kongresa bankedo devis okazi en kafejo Dolfin (kiu konas ĝin?) kaj ke mia kongresa numero estis 657...

La Estraro de UEA, estante konscia pri la koleriĝo de la israelaj samide-anoj, honorigis nin titolante la roterdaman UK-on jene: “52-a UK de Esperanto (Tel-Avivo) Rotterdam” (jes, ili ial skribis Rotterdam, ne Roterdamo...). Sur la kovrilpaĝo de la Kongresa Libro aperas ankaŭ nigrablanka foto de Tel-Avivo (la plaĝo), fotoj de la israela prezidento kaj la urbestro de Tel-Avivo (M. Namir), kaj nomoj kaj adresoj de ĉiuj 119 aliĝintaj israelanoj.

Post la nuligo de la UK I. Dratwer kaj lia edzino deflankiĝis de la israela movado kaj ne plu partoprenis la kunvenojn. Temis pri ofendiĝo aŭ io simila... Sed menciindas, ke malgraŭ tio ili post multaj jaroj decidis herediĝi sian loĝejon al ELI. Tio okazis tre verŝajne dank’ al konvinkita Raĥel, la edzino de nia aktivulo Murĵan.

Kiu organizis samtempe la Kongreson kaj kio estis ĝia sorto? rakontos en la venonta gazetnumero.



kado far  
Josef

Junularan  
Pri tio mi

### Tria parto: La junulara kongreso en Netanja, 1967


En la antaŭa numero de nia revuo mi rakontis pri la 52-UK (*Universala Kongreso de Esperanto*), kiu devis okazi en Tel-Avivo en julio 1967 sed estis nuligita preskaŭ lastmomente pro la Sestaga Milito (5-10 jun.). Sed kio pri la 23-a *IJK (Internacia Junulara Kongreso de Esperanto)*, kiu devis okazi tuj poste en Netanja?



Partoprenantoj de la IJK en Netanja. Videblas Ans kaj Hans Bakker, ilia filo Mark, Jinon Meiri, Aleksander Manor, Josef Murĵan, Moŝe kaj Liora Ben Porat, Moŝe Savir, kaj Ĥana Rot.

Do, UEA decidis translokigi ankaŭ ĝin al Roterdamo. Mi memorigas vin, ke la decido pri la nuligo de ambaŭ kongresoj estis akceptita POST la fino de la milito. Tial la decido rilate la IJK-on ne plaĉis al Moŝe Ben-Porat, 19-jara aktivulo el Netanja, kiu estis la ĉefa organizanto de tiu ĉi kongreso. Li rifuzis akcepti la decidon. Moŝe, kiu loĝis en Netanja kaj lernis Esperanton en 1966 ĉe Moŝe Savir kadre de posttagmeza rondo en lia mezlernejo, sukcesis – preskaŭ sola – ekde la lastaj monatoj de 1966 ĝis junio 1967, organizi la IJK-on, kiu devis okazi en julio `67 en la feri-vilaĝo **Blua Golfo** norde de la urbo. Pli frue, en 1966, ELI decidis sendi lin al Hungarujo por partopreni la 22-an IJK-on, okazontan en la urbo Pécs, kaj ankaŭ la 51-an Budapeŝtan UK-on. En Pécs Moŝe disdonis al la kongresanoj faldfoliojn eldonitan de la urbestro de Netanja. Sur ĝia ĉefpaĝo aperas la jenaj vortoj: "La Urbo Netanja salutas la kongresanojn de la 22-a IJK de TEJO kaj kore invitas ilin al la 23-a IJK en Netanja. Ĝis la revido – Vic-urbestro d-ro A. Bar Menahem." Poste sekvis priskribo de la vidindaĵoj de la gastiga urbo kaj... mencio pri ĝia bonega klimato. (ĉu en 1966 oni ankoraŭ ne ŝvitis en Netanja dumsomere?... Moŝe nun diras, ke oni ŝvitegis, sed neniu plendis...)

Nia juna delegito revenis el Hungarujo al Netanja tre fervora kaj komencis labori. Bonŝance lia patro estis tre alta oficisto en la regiona oficejo de la Ministerio pri Internaj Aferoj, kio helpis al li krei bonajn kontaktojn kun la urbestro kaj kun aliaj ŝtataj instancoj. Oni sukcesis akiri por la kongreso senpagan folklor-programon, organizitan ekskurson (dank` al **Keren-Kajemet**) ktp. Helpis al Moŝe en lia preparlaboro kelkaj pliaj finintoj de la E-kurso, sed verdire la plimulton de la laboro li faris mem. Lia ĉefa helpantino estis lia koramikino Liora, kiu fariĝis poste lia edzino.



Do, kiel mi jam skribis, en junio `67 Moŝe ne konsentis akcepti la nuligo-decidon. Li tuj skribis al UEA minacante, ke se ili ne okazigos la junularan kongreson en Netanja, li rifuzos redoni al ili la monon jam ricevitan de la aliĝintoj. "La milito jam finiĝis kaj la vivo en Israelo estas denove sekura kaj normala. La nuligo de la IJK estas neakceptebla", li skribis al ili. Sekve de tio UEA decidis, ke krom la ĉefa IJK, okazonta en Roterdamo, okazos – tuj post ĝi – kongreseto en Netanja, por tiuj, kiuj deziras iri tien. Do, okazu fakte du internaciaj junularaj kongresoj...

Kaj tiel vere estis: en Netanja kunvenis dum unu semajno (9-16/8/67) kelkaj dekoj da esperantistoj – junuloj kaj aliaj. Kelkaj el ili venis speciale el eksterlando, dezirante esprimi solidarecon kun Israelo. Ekzemple, la fama esperantista familio Bakker venis el Nederlando por ĉi tie kongresi: patro (Hans), patrino (Ans) kaj du infanoj (Mark kaj Ĥaja. Eble dank` al tio Ĥaja vivas nun en Jerusalemo kun siaj edzo kaj 3 infanoj). Mi memoras ankaŭ partoprenantojn el Kanado, Svedujo kaj Pollando. Ankaŭ mi partoprenis la kongreseton, sen tranokto. Ni kunvenis en agrabla loko apud la marbordo kaj loĝis en tendoj. Okazis tuttaga ekskurso al Galileo, vizito al diamantfabriko en Netanja, promenado tra la urbo, vizito al **Ulpan Akiva** (lernejo de la hebrea lingvo), akcepto ĉe la Urbodomo, Nacia Vespero, prelegoj, komuna banado en la maro kaj – kompreneble – multe da amikeca babilado. Regis intima kaj tre bona etoso. Mi menciu kelkajn prelegojn: prelego pri Israelo akompanata de lumbildoj

(Moŝe Savir), prelego pri ekspedicioj al la polusoj (Kamil Perlman), oratora konkurso kaj simpozio pri oficialigo de Esperanto.

Oni ankaŭ inaŭguris straton Zamenhof en Netanja, en la meza parto de la urbo. Do, dank` al la insisto de Moŝe Ben-Porat okazis ankaŭ ci tie eta IJK.

Menciindas, ke parto de la israelaj esperantistoj, kiuj aliĝis al la neokazinta Tel-Aviva UK, partoprenis la IJK-on en Netanja; kaj same kiel estis interkonsentite kun UEA, oni konsideris ilian pagon al la nuligita UK kiel pagon por la IJK.

19 jarojn poste – en aŭgusto 1986 – okazis en Israelo la 42-a IJK. Ĝi okazis – tute hazarde – sufiĉe proksime al Netanja: en la junulara vilaĝo **Neurim**.